

# EKO 2023

**Pensu globe  
Agu loke  
Por la landa,  
Fakaj kaj  
Regiona  
Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko**



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,  
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

**EKO 2023/02. Januaro 4, 2023**

## AMO 97 – temo, dato kaj aliro

La temo estos 'Pacifika progreso', kiu fakte emfazos la malfacilaĵojn progresi en tiu unika mondparto. La dato estos la 14-a de januaro, kaj la horo je la 8-a matene en la Centra Eŭropo (tio estas la 5-a horo vespere en Aŭstralio). La prezentaĵo okazos dum la Melburna somera kursaro tie. El la tuta mondo, ni bonvenigas vian partoprenon! Jen la aliroj:

Meeting ID:893 7876 6904

Passcode:850181


<https://us02web.zoom.us/j/89378766904?pwd=ZnM4K0JabW80Q1Zld1hiYzRiTDRvdz09>

## Belartaj Konkursoj resumitaj

Ekde novembro disponeblas en la Libroservo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) la libro "[Belarta rikolto 2022](#)", kun premiitaj verkoj de la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, tra deko da jaroj, anoncitaj ĉi-jare en la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo. La libro estas parto de la eldona agado de UEA kunlabore kun la eldonejo Mondial el Novjorko. Kun 121 paĝoj ĝi enhavas poezion, prozon, mikronovelojn, teatraĵojn, monologojn/skeĉojn, eseojn kaj kantotekstojn. Eblas ĝin aĉeti rekte en la Libroservo: <https://katalogo.uea.org?inf=8614>.

Laŭ la [regularo](#) de la Belartaj Konkursoj la premiitaj verkoj estas aperigataj en eldonaĵo subtenata de UEA. Ekde 2013 Mondial publikigas ilin sub la titolo "Belarta rikolto": <https://mallonge.net/belarta>. Tio signifas, ke la "Belarta rikolto 2022" estas la deka en la serio. Aldone, en 2021 Mondial aperigis la libron "[Ne ekzistas verdaj steloj](#)", kun 60 mikronoveloj rikoltitaj el la Belartaj: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8783>.

UEA forte rekomendas akiri kaj legi ĉiujn tiujn eldonaĵojn por kultura riĉiĝo kaj subteno al la kulturo en Esperanto.



En 2023 la premi-ceremonio de la 74-a okazigo de la Belartaj Konkursoj okazos dum la 108-a UK en Torino. <https://uk.esperanto.net/2023>. Interesatoj povas sendi kandidatajn verkojn ĝis la **31-a de marto 2023**. La alvoko kun ĉiuj detaloj legeblas ĉe <https://uea.org/gk/1063>. Ĉefrespondecas pri tiu agado la [Komisiono pri la Belartaj Konkursoj](#), kiu ankaŭ prizorgas paĝon pri la konkursoj ĉe Facebook: <https://www.facebook.com/belartajkonkursoj>.

## Pollande eblas gajni la futbalon!

Uzantoj de la telefona Aplikaĵa Programo de *McDonald's* en Pollando povas partopreni lotumadon de pilkoj Adidas Al Rihla League Ball, inspiritaj de la oficiala pilko de la Futbala Mondpokalo 2022. Kiel oni scias, sur la pilko estas teksto en 6 lingvoj, i.a. en Esperanto. La 18-a de decembro estas la lasta lotum-tago en la lando. Oni disponigis entute 15 000 pilkojn. Ĉu ankaŭ en aliaj landoj tia projekto funkcias? La pilko povas esti uzata kiel reklamilo pri Esperanto.

Maria Majerczak

## Bjalistoko kune kun Italio

De la 9a ĝis la 11a de decembro okazis la kutimaj Zamenhof-tagoj en Bjalistoko kaj Italio havis gravan rolon. La unua tago estis la vico de la unua renkontiĝo de la projekto Erasmus+ KA2, kie Istituto italiano di Esperanto estas la ĉefkunordiganto kun partneroj UEA (Nederlando), Kosmo (Germanio), BES (Pollando). Partoprenis Laura Brazzabeni kaj Bruĉjo Casini de IIE, kiel ĝenerala direktoro kaj sekretario, kaj ankaŭ du italoj Francesco Maurelli kaj Sara Spanò por Kosmo.

Okazis ankaŭ prelego de Bruĉjo Casini pri la projekto "[www.30oredoro.it](http://www.30oredoro.it)" (la 30-oraj horoj) kaj prezentado de la sperto de EsperRadio fare de Laura Brazzabeni. Ne mankis aliaj prelegoj de Walter Zelazny, de Teresa Pomorska "Prezentado de Vroclava Erasmus+", kiu okazis en Italio dum la itala kongreso en Brescia, de Nina Pietuchowska pri la praarbaro de Bialowieza, kie okazis la tuttaga ekskurso sub la neĝo, de la tiel nomata Kubo pri projekto Erasmus Vikipedio por Eŭropo kaj denove Italio kun Sara Spanò kaj prelego pri "Krevoj en la realo: enkonduko pri la perturba arta ĝenro".

Koncertoj amuzis nin dum la restado: "Ukulelo kaj Esperanto" koncerteto de pliaĝuloj el Centro de Socia Aktiveco en Bjalistoko; "Kantoj de Mordeĥaj Gebirtig en Esperanto-traduko de Mikaelo Bronŝtejn kun la grupo Frey-Lech Band, kaj ĴOMART kaj NATASHA, kiuj denove povis koncerti vive post kelkaj jaroj.

La etoso estis vere bela kaj familia kun komunaj manĝoj kaj kun solena flormetado al la monumento de L. L. Zamenhof en placo de la urbo kun ankaŭ la ĉeesto de la urbestro kaj aŭtoritatoj..

Kortuŝa estis la solena enmanigo de la Bronza Medalo "Merita por kulturo Gloria Artis" de la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo al ROMAN DOBRZYNSKI (vidu EKO 2023/01). Ankaŭ la katolika meso en Esperanto ne mankis. kaj la naskiĝtaga kuko. La tuto estis organizata de BES, la bjalistoka grupo danke al ĉefe Nina kaj Przemek kaj la tuta loka grupo.

Laura Brazzabeni

## Japanio pri Lusin kaj kontraŭ milito

Anoj de Saitama Esperanto-Societo en Japanio legis la novelon "Antimilitisto" de Lusin okaze de komuna legado de la Tago de libro 2022. Elekto de la novelo estas ĝustatempa ĉar tie kaj ĉi tie tra la mondo homoj militas. Ni sincere diskutis pri la filozofio de Lusin: nemilitismo kaj pacifismo. Komuna legado donis al ni bonan okazon pensi pri homoj. "Ne malvenki sen militi" estas nia konkludo. Nia kunsido okazis rete.

Tieko Isikawa

## Lingva Festivalo en Moskvo

La 11an de decembro 2022 en la Ruslanda ĉefurbo unuafoje post 2019 okazis ĉeeste la Moskva Lingva Festivalo kun 55 lingvoprezentantoj, ĉ. 30 prilingvistikaj prelegoj kaj rekorde multaj, 1995 vizitantoj. Legu prian artikolon de Irina Gonĉarova en La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2022/12/ruslando-38/>

## Parma Esperanto-Asocio: "L' almozulo"

Membroj de Esperanto-Asocio "Giorgio Canuto" de Parma, Italio, legas la poemon "L' almozulo" de Raymond Schwartz. Ĝi estas parto de lia poemaro "La Stranga Butiko", kiun ILEI proponis por la internacia komuna legado de la Tago de la Esperanta Libro 2022. [https://www.youtube.com/watch?v=wV7K4CX\\_2Hc](https://www.youtube.com/watch?v=wV7K4CX_2Hc)

Alessandra Madella, Parma Esperanto-Asocio: "L' almozulo"

## Nova pli bona vojo al Juna amiko

La estraro de ILEI decidis ŝanĝi la aliĝ-formularon kaj la formularon por aboni la revuon por lernantoj, *Juna Amiko*. Vi trovas nun la novajn en la retejo de ILEI, kun nova akompana teksto de klarigoj. Oni povas rekte skribi sur ili, sen devi nepre elŝuti kaj printi ilin.

La plej grava afero estas, ke oni nepre kontaktu nian novan membro-administranton Hamzeh Shafiee kaj nian kasistinon Karine Arakelyan.

Alessandra Madella

## Z-festo en Bialistoko, Pollando

Jen filmeto

<https://youtu.be/DAEwEsun2m4>

prof. Laura Brazzabeni, direttore generale IIE

Tel: +39 3286461063 (ankaŭ whatsapp); <http://istituto.esperanto.it>

## Tomskaj festadoj

Mez-decembre 2022, en urbo Tomsk (Rusio), kolektiĝis 10 tomskaj esperantistoj por kunfesti kaj kunfesteni la 163-an naskiĝtagon de nia kara majstro Lazarj Markoviĉ Zamenhof. Ni kuntrinkis vinon, kiu nomiĝis laŭ la Eo-vorto 'Vino', kaj kiu estas libere aĉetebla en tomskaj magazenoj. Ni preparadis novajn surtablajn E-ludojn kaj esperantumis. Parte partoprenis ankaŭ pluraj esperantistoj el aliaj rusiaj urboj kaj el aliaj landoj per la interreto.

## Senegalo preparis sin por la afrika kongreso

Mi ricevis fotojn de la ĉefaj aktoroj de tiu tre sukcesa agado. Mi povas per raportoj kaj filmoj sekvi la tre rapidan progreson de la gestudentoj en Dakaro kaj Rufisko. Mi tre dankas al Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta, la ĉefaj motoroj de la Esperanto-Movado en Senegalo, kaj al Vjaĉeslav Ivanov kaj Espoir Kasati, kiuj instruas efike, amuze kaj pozitive, arde kaj pasie.



Mireille Grosjean, membro de la Fonduso de Parzival pri paco kaj malmarmado.

## Jarfina pripesado de 2022 el Litovio

En la kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA), okazinta la 10-an de decembro en Kaŭno, la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas raportis pri la agado de la asocio dum la 2022-a jaro, interalie, pri la sukcesa BET-56 en Klajpedo, ampleksa informado, revigliĝo de la junulara movado, novaj eldonaĵoj, definitiva perdo de la asocia domo en Kaŭno kaj pri aliaj temoj. Legu pli en la novaĵretejo 'La Ondo de Esperanto'

<https://sezonoj.ru/2022/12/litovio-54/>

===== vortoj: 1150 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.